

Augustin Wibbelt,

## Sola

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Mortas post arbaro jen  
Vesper-ruĝo nun,  
Lante supreniĝas la  
Granda, frida lun'

Blanka fluso de nebul'  
Kuŝas ĉie ĉi,  
Tra la ros-malseka gres'  
Iras sola mi.

Paŝas mi tra l' mort-trankvil'  
Kave sonas ĝi,  
Glitas mia ombro nur  
Kaŝe apud mi.

*Traduko de la Basgermana poemo "Alleen" de AUGUSTIN WIBBELT (\*1862-09-19 – †1947-09-14) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).*

*Arg-578-1166 (2012-03-09 09:35:18)*

*Verkita de la poeto Vibelto, Aŭgusteno (Augustin Wibbelt, 1862 - 1947).*

*Esperantigis: Manfredo Ratislavo (Manfred Retzlaff, \*04.11.1938) en 2011-11-22 laŭ la origina basgermanalingva teksto.*